

HELSINGVÄNED

PUBLIKA
AŬKCIO:



N°87. Ŝua
signo de L. L.
Zamenhof. Komenca
kosto: 5.000 steloj.

Direktoro: M. A. Sancho
 Vicidirektoro: N. Millán
 Ĉefredaktoro: Fco. J. Moleón
 Ĉefdesegnisto: J. J. Vázquez
 Kaseisto: J. Bueno

Kunlaborantoj: A. Ma R nero
 L. L. Z menhof
 A. Vardó
 Zora Heide

LA KOVRILLO: Fotome-
 nike ne ĉita per ko-
 nutilo de retrotempo
 detektado.

H.E.J.S

INDEKSO

- Paĝo 2 Ĉefartikolo: "Ne detruu nian esperon..
 " 6 La Radiko kaj la Homo.
 " 8 Jempli pri Ferrer Guardia.
 " 10..... Stranga Limo.
 " 12..... La Aventuroj de Tinĉjo en Esperanto.
 " 13..... Mafalda.
 " 15..... Literaturo. Humoro.
 " 16..... Krucvorteniemo.
 " 17..... Kelkaj Ideoj.
 " 19..... Musika Aktualo.
 " 20..... Ni Aĝo.
 " 21..... Letro de Norberto Salotti.
 " 22..... Humoro.
 " 24..... La Laredo de Aitor.
 " 27..... Saka Kuriozaĵo.
 " 28..... Estraro kaj Delegitaro.

RIMARKO: Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. Rilate la Ĉefartikolon, la redaktistaro arogas ĝin.

SIDEJO: Madrida Esperanto-Liceo. C/ Atocha, 98-42
 Madrido - 12 Telefono (311) 2 30 37 38

CEFARTIKOLO

Ne detruu nian esperon...

De iom pli ol unu jaro kaj duono mi komencis agi ene de la Esperanto-Movado. Post kelkaj monatoj de mia eklern^o mi havis la ŝancon ĉeesti la nasintj aran kongreson hispanan de Esperanto okazintan en - Madrido. Tie, kvankam mi nenion komprenis, mi vidis la reorganizigon de la Junulara Sekcio de H.E.F.

Kiam oni klarigis al mi kio ĝi estas kaj la diversajn eventojn kiuj okazis antaŭe, mi multe ĝojĝis, ĉar mi pensis, ke nia asocio denove funkcios kiel - la plej vigla sekcio de la Federacio. Kun granda intereso mi aliĝis la organizon trovante grandan kvanton da gejunuloj vere emaj labori por kaj per Esperanto renovigante la "sangon" de la movado, kaj amuzante samtempe.

Tiujn interesojn, tiujn ĝojojn, tiujn laboremojn oni detruis kiam ĉiuj konstatis, ke H.E.J.S., malgraŭ la bonvolemo de ĉiuj, ne funkciis bone: preskaŭ ses monatojn ni devis atendi antaŭ ol legi la unuan numeron de la Oficiala Organo, kaj la samon por tion fari kun la dua. En tiuj numeroj mi ne trovis, aliflanke, puŝvortojn aŭ emigajn frazojn. La enaĵaro ŝajnis al mi, ke nenio okazas en H.E.J.S., kaj pro la perdo de la intereso, tio estas la bedaŭrinda vero: nenio okazas en H.E.J.S.. Al fora spektanto la membraro de la Junulara Sekcio povas aspekti kvazaŭ ĝi ne volus daŭri.

La demisio de C. Moya certigis la ekziston de reala krizo en nia Organizo. Dum la tendaro de Elkso, la Renkontiĝo Internacia de Bilbao, kaj la Kongreso de Murcio, okazis longaj dialogoj kie ni povis konstati ĉion ĉi. Ni atingis la konkludon, ke H.E.J.S. bezonas grandan ŝanĝon, ne pri la estraro nek pri la membraro, sed pri la celaro kaj idearo kiuj kon-

sistigas la koncepton de nia Organizo.

Multaj mankoj videbliĝas antaŭ ni. Ĉiuj ni devas malaperigi ilin per senlaca zorgado. Kion ni povis fari?

a) Kontaktojn kun Radio kaj Televido. Ĵurnalojn kaj revuojn ankaŭ ni devas viziti.

b) Altitadon de la nombro de delegitoj, reorganizadon de la reto per kontaktado kun la grupoj.

c) Plian kontakton de la estraro kun la grupoj - kaj ĉiuj delegitoj. Plian unuiĝon inter ĉiuj membroj de la estraro.

ĉ) Ampleksigadon de la helpe por la tendaroj.

d) Altitadon de la lingva nivelo.

e) Elpensadon de novaj ekonomiaj rimedoj: lotado subvencioj, k.t.p.

f) Eniradon en T.E.J.O. per la interŝanĝado de otanta poŝtado. Kiam la nivelo kaj la kapablo estos taksitaj, preni respondecojn pri nia partoprenado en internaciaj aranĝoj, ĉu kongresoj, ĉu interligiloj.

g) Ĉion, kion iu "juna menso" povas pensi.

La difekto ne estis la nelaboremo sed la neelzisto de la bazo, por tion atingi. Aliflanke la saman laboron oni povas fari per malsimila celo, ĉar estas la celo kaj la koncepto de la Organizo tio, kion ni devas ŝanĝi.

Ŝanĝi la metodon. La "interna ideo" ne sufiĉas, ni bezonas ion pli: vidi la uzon kaj la utilon de la lingvo konstante.

Ŝanĝi la agemon. Nuntempe, ĝenerale, ne ekzistas.

Ŝanĝi la respondecojn de la delegitoj. La apero de niaj nomoj en la revuo, kaj nenion fari ne estas vera laboro, kiam oni devas profiti la agadon de ĉiuj.

Ŝanĝi la varbadsistemon. Ni devas informi la junularon, kaj ne atendi, ke ĝi venos por nin demandi.

Ŝanĝi la celojn de la Organizo: nek juneco por Esperanto, nek Esperanto por juneco, sed la du samtempe.

pe.

Ŝanĝi niajn ideojn. Ni estas en Organizo de la -- okdekaj jaroj kaj ne de antaŭ tridek.

Atinxi, entute, novan dinamikon.

Por ŝanĝo, tamen, ni bezonas:

Pruvi al la popolo, ke ni estas junaj esperantistoj, kaj ne "senaktivistoj". Ni serĉu la mondan interkompreniĝon kaj amikecon. Ni amu la rajton de ĉiu popolo sin esprimi en sia propra lingvo, kaj ne la verdan stelon (kvankam mi ĉin portas kiel simbolon). Ni afable informu, ne fanatike konvinku.

Ordigi nin. Ne atingas plie kiu multe ŝatas Esperanton, sed kiu bone laboras por ĝi. Oni bezonas ideojn kaj personojn pretajn ilin realigi en la necesaj instancoj.

Ampleksigi nian akadkamon. La universitatoj kaj superaj lernejoj aendos nin. Kial ni ne proparand- as tie?

Ne gravas aperigi niajn novaĵojn en Heroldo, Mona to aŭ Esperanto. Ne gravas multe "brui", se ni "atin- gas rezulton de tio. La celo de la Organizo ne de- vas esti, ŝajni ke ĝi funkcias bone, sed funkcii bo- ne.

La tuton ni devas ŝanĝi. Kial ne rekomenciĝi?

Por tio ĉiu ajn devas alporti ion. Ni deziras rea- ligi iun novan H.E.J.S., iun novan esperon por la hispana Esperanto-Movado en la estonteco. Anstataŭi la neekzistantan formasantan esperantistaron: junu- laro estas ne nur junaj personoj sed tiuj, kiuj en sia koro sentas la junecan.

Tiel nin helpu. Aro da diversaj personoj laboras por iu bona estonteco de Esperanto.

Ne detruu nian esperon...

Miguel A. Sencho Pardo
Direktoro de "HEJS-Juneĉo"
Madrida delegito de HEJS

La Radiado kaj la Homo

La radioaktiveco, posedaĵo kiun havas iuj korpaj emisii materiajn partikulojn, estas unu - el tiuj grandaj fortoj de la naturo, kiujn nia civilizo uzas por sia subtenado kaj disvolvado. Tamen, tiu posedaĵo, pro la karakterizaĵoj mem kiuj igas ĝin tiel efektiva kaj utila por - celoj tiel pacaj kiel militaj, povas esti ege - malutila por la homo.

Efekte, la radiado estas ankaŭ unu el la pl - ejoj danĝeraj patogenaj agentoj, kiuj minacas la vivantajn estaĵojn.

La kuracistoj rilatigas al la radiado la ap - eradon de kelkaj malsanoj, de la kancero ĝis la genetikaj difektoj, kaj ankaŭ la generala heran - redukto de vivo. Kelkaj partoj korpaj estas aparte vundeblaj al la influoj de la radiado: la gonadoj, la tiroideo kaj la osta medolo estas ke - lkaj el ili.

La sciencistoj certigas, ke la vivantaj es - taĵoj senĉese naturforme ricevas radiadon. Ekze - mple la kosmaj radioj, devenantaj el Universo , kaj la radiado disiĝanta el uranio, radiumo, to - rio, radioaktiva karbo kaj kalio, estas parto - de la ekstera medio en kiu disvolviĝas la norma la vivo.

Krome, al ĉi tiuj naturaj formoj, oni devas aldoni la formojn kreitajn de la homo en ties - civiliza intenco. La iksoradiaj medicinaj apara - toj, la televidiloj, la brakhorloĝoj kun radiuma ciferpato kaj la nukleaj reaktotoj pliigas la nivelon de radiado fiksitajn de la naturo. Laŭ la radiobiologiistoj, 600 rem-a ("rem": mezuru - nuo de ekspono al la radiado) dozo estas mortiga por preskaŭ ĉiuj vivantaj estaĵoj. Nu, la ra

diado tiel natura kiel artefarita kaŭzas 0,2 re-
m-ajn dozojn ĉiujare, laŭ kalkuloj de Kenneth -
Weaver.

Francisco Javier Moleón García



Li korektas HEJS

IOM PLI PRI FERRER GUARDIA

En 1900, Francisco Ferrer Guardia estis kulpigita, ĉar oni supozis ke li instigis la malsukcesigintan atencan agon kiun suferis Alfonso la XIII en sia edziĝtago.

En septembro de 1909, oni malliberigis lin denove pro partopreno en la Tragika Semajno kaj poste oni kondamnis lin morti kiel ĉefon de la ribelo.

Ni ĉiuj scias tion, sed ne multaj konas la grandiozan pedagogian aktivadon kiun faris la fondinto de la Moderna Lernejo.

Tiamaniere oni povas resumi lian pedagogian sistemon: laikeco, kontraŭstateco, rajtegaleco kaj sciencieco.

Laŭ la programo de la Moderna Lernejo, la edukado estas politika problemo:

"La registraroj baziĝas sur la instruoj kaj monopoligas ĝin. La popolo nescio jam ne devas daŭrigi. Se la popolo lernas, la ekonomia situacio vere progresos".

Sed la instruado ne influis al la homa emancipado; ĝi estis nur ilo por eduki laboremulojn kaj pliigi la producion.

Kiam Ferrer parolas pri la scienca kaj racia edukado, li precizigas ke ĝi devas servi la verajn homnecojn anstataŭ la kapitalo aŭ la burĝaro.

Li preferas la klassocian komunedukadon. Aliflanke li pensas ke viro kaj virino perfektigas sin reciproke kaj ambaŭ devas partopreni en la homlaboro; do, li protektas ankaŭ la sekskun edukadon.

Pri la temo ekskluzive pedagogia, en la Moderna Lernejo oni praktikis tutnovajn sistemojn.

La forigado de la distanco inter lernantoj kaj instruistoj, la rupturo de la severa disigo inter la

STRAWGA LIMO

klaso kaj la ekstera mondo kaj la forigo de premioj kaj punoj, estas kelkaj el ties karakterizaĵoj.

Tie, la infano estas tute libera. Oni permesas al li, stariĝi por skribi aŭ desegni en la nigra tabulo, legi librojn, pripensi aŭ, se li deziras tion fari, li povas forlasi la klason.

La ludado kaj la libervola imagkreado ekpartoprenas en la edukprocezo.

Ferrer instruas ĝardenistikon, manfareblaĵojn kaj hejmajn laborojn, kiel helpilojn por samnivele loki ambaŭ seksojn kaj harmoniigi la fizikan ekzercon kaj la intelektan aktivadon.

Finfine, li klopodas, ke la infano mem serĉu la komponson se siaj fizikaj, intelektaj kaj moralaj necesoj kaj eviti ĝi iĝos nekritikokapabla ulo.

Natividad Millán Santamaría




STRANGA LIMO

Objektoj ĵuse eltrovitaj ĉe la spaco ŝajnas neobei la leĝojn de la naturo.

La astronemoj scias ke la gravito estas unu el la fortoj plej malfortaj el universo.

Ili ankoraŭ miriĝas kiam trovas, ke kelkfoje povas kreiĝi materio kaj energio el la nenio. La loko en kiu ĉi tio okazas nomiĝas nigra truoj, la gravitforto estas tiel intensa, ke iu ajn aĵo kiu alproksimiĝas estus absorbita internen. Inkluzive la lumradioj ne povas foreviti ĝian forton. Nigra truoj estas tute nevideblaj!



La nigraj truoj kurbiĝas en la spaco kreante "funnelan" efekton.

NASKIGO DE NIGRA TRUO

La nigraj truoj estas la rezultato de procezo kiu nomiĝas gravita kolapso. La atomoj de stelo estas tre premitaj unu apud la alia, pro kio la steloj fariĝas ĉiufoje pli densaj.

Povas okazi ĉi tio kiam la giganta stelo eksplodas fortege.

La eksteraj tavoloj de la steloj estas forpelataj al la spaco. Se restas sufiĉe da materialo ĉe la kerno, kuntiriĝas formante malgrandan kaj superdensan globon kiu nomiĝas neŭtrona stelo. Almetujo plena je ĝia materio pezus 100 tunmilionojn. Kiam neŭtrona stelo rompiĝas, forpelas rapidajn eksplodojn de radiacio al universo.

Iuj neŭtronaj steloj kuntiriĝas ankoraŭ pli ĝis konvertiĝo en nigraj truoj. Nigra truo estas kurioza objekto, malgranda kaj densa!

Iu ajn aĵo kiu ĵalus en ĝia interno povus esti absorбата ĝis oni ĝin forpelos eksteren de nia universo.

Jorge Bueno Sequera

ABONKOTIZOJ:

- 1) Membro (H.E.J.S.-Juneco kaj Koncize)... 250
- 2) Abonanto (H.E.J.S.-Juneco)..... 150

Ciuj membroj de H.E.F. malpli aĝaj ol 25 jaroj aŭtomate estas H.E.J.S.-anoj.

H.E.F.-kotizo: 500 p-toj.

LA AVENTUROJ DE TINĈJO EN ESPERANTO

"Tinĉjo kaj la krabo kun oraj pinĉiloj" estas la estitolo de la aventuro per kiu "tinĉjo" parolas de la pasinta ĵaŭdo al dek milionoj da personoj, kiuj en la mondo interkompreneĝas en Esperanto.

Tradukite en 25 lingvojn kaj dialektojn, inter ili la bretonan kaj provencan lingvojn, "Tinĉjo", la universala ĵurnalistoj de la infana komiksaro, ĉiam akompanata de sia fidelega hundo - "Lilu", la kapitano Haddock kaj aliaj neforgeseblaj roluloj, ekde nun pliigas sian aŭdiencon - esprimiĝante en lingvo, kiun iuj konsideras la estonteca.

"Ni, per la Esperanta-eldono de tiu verko - de Herge - rimarkigis al Efe la prezidento de Flandra Esperanto - Ligo, Wrin Loos-, pretendis oferi al la lernantaro de ĉi tiu lingvo perspektive alian ilon kaj interesigi la infanaron pri la lernado de Esperanto".

Ludoviko Lazaro Zamenhof, pola okulisto, kiu en 1887 koncentris kaj publikigis la unuan libron en Esperanto - sinteza lingvo kreita de li - ne povis, verŝajne, tiam imagi, ke oni iam eldonos bildajn librojn en la lingvo, kiun li kreis.

"Ni, efektive - manifestas la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Gregoire Maertens - jam publikigis unu volumon de "Asteriks", pro kio la aventuroj de "Tinĉjo", kiujn oni en Belgio ekvendos la proksiman monaton, estas nia dua sperto en la komiksa kampo". Disĉetita en 90 landoj de la tuta mondo, la esperantistaro, de antaŭ preskaŭ unu jarcento, intencas konvinki - la popolon, ke la lingvo kreita de Zamenhof estas la universala lingvo. Nune pli ol 33.000

ĉiajn verkojn oni tradukis en Esperanton, ĉirkaŭ cent ĵurnalojn oni eldonas ĉi-lingve en la tuta mondo, 17 radiostacioj elsendas programojn en Esperanto kaj 20 universitatoj instruas ĉi-tiun lingvon.

La blonda tufo de Tinĉjo trairas de 1928 ĉiujn landojn de la terglobo, multfoje super politikaj reĝimoj kaj ideologioj, kaj fariĝis la komiksa simbolo "por infanoj de sen ĝis sendek sep jaroj". De 1929 ĝis 1976, Herge publikigis 22 volumojn de "Tinĉjo", kies eldonkvanto estis po 1.300.000 ekzempleroj ĉiu. Oni en la tuta mondo vendis pli ol 30.000.000 da albumoj de franclingvaj eldonoj, kaj oni nune pagas grandegajn monsumojn por la malabundaj ekzempleroj de la unuaj eldonoj, kiel okazis antaŭ malmultaj semajnoj pri volumo de "Tinĉjo" en la lando de la "sovetoj", eldonita en 1930. (1)

Francisco Javier Moleón

(1) Tradukite el la ĵurnalo "Ya" de la 29a de Aŭgusto, 1.981.



MAF ALDA



littersupo

O	N	O	I	D	R	O	K	A	B
K	H	T	A	M	B	U	R	O	G
A	S	E	K	P	T	T	V	I	O
T	Z	I	R	K	I	H	T	U	T
E	I	C	L	D	N	A	N	Ĉ	E
F	L	U	T	O	R	R	N	F	P
G	H	Ĉ	E	O	F	P	L	O	M
V	I	O	L	O	N	O	R	M	U
M	U	B	F	K	J	M	N	S	R
I	O	L	A	B	M	I	C	O	T

Malkovru la nomojn de dek muzikajn instrumentojn. Kalkulu viajn inĝenion kaj paciencon.



METAFIZIKA SPRITAĴO



... ALIA SAME ...

Krucvortenigma

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1			R	A	V			O	
2			E	N	Ĝ	R	I		V
3		Z		O	V	O		D	O
4		E	B		I		P	I	R
5		Ŭ	O				R	I	T
6		S	J				I	N	A
7		O		I		O		O	R
8	I		O	L	I	V	O		O
9			A		A	D	O		

Horizontale

1. Brava viro.
2. Konsonanto. Iri en iu loko. Konsonanto.
3. Prunti (radiko). Ni akiras ĝin el kokinoj. Muzika noto.
4. Ĉe la romianoj, dio pri la infero (radiko). Vokalo. Frukto (radiko).
5. Diversaj eroj el kiuj konsistas la tuto (radiko). Civitano de iu lando de Eŭropo (radiko).
6. Persona nedefinita pronomo. Konsonanto. Virina.
7. Muzika noto. Malo de reveno. Multvalora metalo (radiko).
8. Vokalo. Frukto uzata por produktado de oleo. Vokalo
9. Projektado, skizado.

Vertikale

1. Peni.
2. Konsonanto. Helena dio, patro de la titanoj. Konsonanto.
3. Prefikso montranta ripeton. Bleki (radiko). Inverse, interjekcio uzata por alvoki telefon-korespondanton.
4. Membro. Konsonanto. Inverse, malsimila, ne la sama (radiko).
5. Ekzisti. Hararo de ĉevalo (radiko).
6. Taŭro. Konsonanto. Inverse, la patro de nia patro aŭ patri no.
7. Persona pronomo. Prepozicio. Lirika poemo (radiko).
8. Vokalo. Minerva estis... Vokalo.
9. Leksikono.

Kelkaj Ideoj

Nia grupo deziras klarigi paron da novaj elementaj kursoj, kaj kunsidi unufoje semajne por praktiki. Ni havas ankaŭ la intencon partopreni la venontan tendaron en Logronjo, kiun ni konsideras grava por Esperanto. Samtempe ni amuzos, konante aliajn junajn samideanojn.

Ni opinias ke, la tendaroj estos kie ni povas vere decidi, sen perfortoj, t.e. inter seĝunuloj, ĉar ni kredas ke, ni estas memsufiĉaj por "funkcii", kvankam al ni mankas la sperto de la plenkreskuloj.

Kelkaj el ni partoprenis la du lastajn kunvenojn okazintajn nacie, kaj ni portas la penon, ne povi nin esprimi oficiale kion ni pensas, pro diversaj kaŭzoj: manko de tempo, neekzisto de veraj kunsidoj, k.t.p. - Ni esperas ke, en Logronjo, tio ne okazos denove. -- Krom tio, mi eksponas kelkajn ideojn, kiujn ĉiuj interesiuloj povas realigi, se oni konsideras ilin eblaj. Ni opinias ke, ili povas plialtigi la Esperanto-Movadon:

- Dum la futbolkampioneo ni povos montri salutafilojn en la stadioj, kie okazos la matĉoj, kiel jam aliffoje oni faris.

- Kiel vi scias, en Gandio ekzistas la nura Esperanto-Oazo de Hispanio. Estus konvene potencigi ĝin per vizitoj aŭ propagando.

- Interŝanĝo de opinioj pri la plej bonaj metodoj uzataj en ĉiu grupo por la lernado de elementaj kaj superaj kursoj.

- Skribi al esperantaj radioelsendejoj celante montri nian intereson, por ke ili daŭros. Tion saman konsilas Heroldo en la numero 2 (1677).

- Klopodi la atingon de MF-aj radioemisioj. Ili -- propagandas Esperanton, kaj faciligas la vojon de la interesiuloj, por ke ili aliĝos la kursojn. En tiu senco ni povas labori favore la atingon de iu programo en la kultura sekcio de Nacia Radio MF-3.

- Sonbendigi esperantajn kantojn, kaj vendi la kantojn sedojn al la interesiuloj.

- Atingi iun plialtigon de la H.E.F.-a kotizo, aŭ akcepti loton klubare (aŭ anbaŭ aferoj samtempe), por subvencii vojaĝojn de gejunuloj al eksterlando. Ni povas distribui tiujn subvenciojn per konkursoj, aŭ premioj al tiuj, kiuj ofte kunlaboras en esperantaj revuoj aŭ realigas konstantan laboron por Esperanto.

- Perfektigaj seminarioj pri la lingva nivelo kaj organizigaj metodoj povas okazi en allogaj lokoj dum la someraj ferioj, speciale por delegitoj aŭ personoj kiuj poste klarigos kursojn.

- Oni povas atingi la eblecon partopreni en laborbrigadoj organizataj de la "Instituto pri la Juneco kaj Komuna Promocio", kiu sidĵas en Madrido (strato Ortega y Gasset, 71; telefono 4 01 12 00).

- Interŝanĝi gejunulojn en privataj loĝejoj, same kiel okazas por la lernado de aliaj lingvoj, sed por malsimila celo.

- Krei arĥivon pri novaĵoj aperintaj en ĵurnaloj, kaj sonbendigi la emisiojn de Radio kaj Televido pri Esperanto.

Bone, momente ni jam ne havas pliajn ideojn en la "cerbo", do ĝis la venonta.

Antonio Verdú (delegito de H.E.F. J.S.) nome de Esperanto-grupo de Elkso.



MUZIKA AKTUALO

Dum la septembra monato aperis interesa son disko. Ĝi estas "Friday Night in San Francisco" (Vendredo nokte en Sanfrancisko) kaj ĝi estas 1 udita de tri grandaj gitaristoj: AL DIMEOLA, PA CO DE LUCIA kaj JOHN MCLAUGHLIN. Ĉi tiu disko - estas sonbendigita senpere escepte de la lasta kanzono.

Ankaŭ dum la sama monato aperis nova revuo pri muziko. Ĝi estas "Rock espezial". En la unu a ekzemplero, ni povas legi intervidiĝon kun - STING, la ĉefo de la grupo POLICE (Polico) kaj - aliajn interesajn artikolojn. La direktoro de ĉi tiu revuo estas DAMIAN PEREZ PUIG kaj en ĝi kun laboras multaj konitaj personoj kiel DIEGO MANRIQUE, ANGEL CASAS, k.t.p. Ili ĉiuj jam konitaj pro sia laboro en alia revuo kiu nomiĝis "Vibra ciones" (Vibrecoj).

La ROLLING STONES (Rulantaj Stonoj) publikigis sian novan diskon "Tattoo You" (Tatuu vin) - sufiĉe diskutebla. La unua faco estas akcepte--bla, kun sia maljuna stilo, sed la dua estas enu igita kaj kantita falsete.

La trumpetisto MILES DAVIS ĵuse publikigis sian atenditan novan diskon, post sep jaroj eldonanta nenium. La disko nomiĝas "The man with the horn" (La viro kun la korno)

Alia disko eldonita antaŭnelonge estas "Mi niaturoj". Amuza sondisko kiu havas kvindek unu kanzonojn kiu daŭras po unu minuto ĉiu.

Ĵuse, multaj muzikistoj ludis en Hispanio. Inter ili, elstaras IAN DURY, GENESIS (Genezo), GINGER BAKER kaj la multaspekta KEVIN AYERS.

Baldaŭ, la angla grupo POLICE (Polico) eldonos "La fantomo en la maŝino", kvara disko de ĉi tiu grupo kiu ĉiufoje gajnas vendojn kaj per das kvaliton.

NIA AGADO

Por sufiĉe bone informi, ni ne povas forgesi la pasintan Hispanan Esperanto-kongreson okazintan julie en Murcio. Pri ĝi vi preskaŭ konas ĉion per la revuo de la Federacio "Boletín". Sed estas konvene rememori tamen kelkajn aranĝojn rilatantajn la junularon: unue gratuli la L.K.K.-anojn pro iliaj laboro kaj juneco, kaj due ni sciu pri la H.E.J.S.-a kunsido.

Dum ĝi unue parolis Norberto Saletti, direktoro de Koncize, kiu longe priskribis sian laboron, kaj poste sinjoro Aramay pritraktis kelkajn punktojn de nia problemaro. La diskuto estis longa kaj eble nesufiĉa, -- sed finfine oni decidis la denovan eldonadon de la revuo "H.E.J.S.-Juneco", kaj la partoprenadon de nia -- Asocio en la redaktado de la gazeto Koncize (rigardu fotokonion malgrandigitan de la letero kiun la estraro sendis al Norberto Saletti.) Aparte la oftaj dialogoj inter delegitoj konstatis al mi la grandan interreson de ĉiuj membroj plibonigi la Asocion.

Alia fakto de nia agado estas la komenco de la aranĝado pri la venonta H.E.J.S.-Tendaro en Logronjo. --- Miaj kontaktoj kun Ana María Ranero montras, ke oni laboras dense. Por tion atingi, en Madrido Juan Carlos Ruiz kaj mi laboras pri la propagando kaj la atingo de iu subvencio. Ni vizitis la Ministerion pri Kulturo, kaj kontaktis kun la koncerna oficejo. Espereble nia agado plenumiĝos sukcese.

Baldaŭ oni sendos al ĉiuj gejunuloj specialan inviton por la venonta tendaro, kie ni plie informos pri ĝi.

Ni petos de la "Instituto pri la Juneco" ankaŭ la eblecon loĝi dum la tendaro en malmultekosta aŭ senpaga restadejo.

Pri ĉio ĉi ni informos en venontaj numeroj.

Miguel A. Sancho

Sendita al Ĉefredaktoro de *Koncize* en Italio

Bacelona, 5 de septembro de 1981

Kara amikoj :

Laŭ viaj indikoj, ekde de la 41-a Hispana Esperanta Kongreso en Aŭrcio, la estraro de HEJS decidis oficialigigi la kunlaboron inter *Koncize* kaj HEJS, pro tio, sube ni faras la oficialan proponon.

"La estraro de HEJS decidis en la lasta kunveno peti al vi la oficialigon de nia landa junulara sekcio en la revuo *Koncize*, kunlaborante en tiu senco en la redaktado de unu paĝo, kaj eldonante 100 ekzemplerojn de ĉiuj numeroj de *Koncize*"

Mi rememoras al vi la jenajn punktojn :

1.-HEJS estas Landa Sekcio (junulara sekcio de Hispana Esperanta Federacio) kaj kunlaboris kun TEJO ekde 1980, tio estas pli ol 20 jaroj.

2.-HEJS regule informas al la hispanaj Esperantistaroj pri TEJO, KONCIZE kaj aliaj internaciaj junularaj aranĝoj pere de sia propra organo HEJS-JUNECO kaj unu paĝo en la organo (BOLETIN) de Hispana Esperanta Federacio.

3.-HEJS estis oficialigita kiel Landa Sekcio per TEJO

4.-HEJS estis ankaŭ oficialigita per UEA kiel Landa Junulara Sekcio (Vidu Jarlibro 1981)

Atendante ke nia peto estos urĝe akceptata ni edziĝas vin kaj deziras al vi grandan sukceson en via nova labaro.

Salutojn.

Jordi Ferré i Martínez
HEJS-Prezidanto.

ATENTU:Kompreneble, atendante vian decidon, kiel antaŭe, ni eldonos 100 ekzemplerojn de *Koncize* per dediĉi ilin al la gejunularoj. Indiku tiam al la eldonaĵo de *Koncize*.

HUMORO

Viro eniras en trinkejon kaj petas...

- Bonvolu doni al mi glason da biero kaj du kukumetojn.

La kelnero donas ĝin al li. La viro trinkas la bieron, metas la kukumetojn sur siajn orelojn, pagas kaj foriras.

La sekvontan tagon li agas same. La kelnero strangiĝas kaj pensas...

- Morgaŭ mi diros al li, ke ne estas kukumetoj.

La sekvontan tagon alvenas la viro kaj diras...

- Bonvolu doni al mi glason da biero kaj du kukumetojn.

- Mi bedaŭras ne servi al vi - respondas la kelnero - sed mi ne havas kukumetojn.

- Kion vi havas?

- Mi havas olivojn, mitulojn, k.t.p...


- Bone, donu al mi glason da biero kaj du olivojn.

La viro trinkas la bieron, metas la olivojn sur siajn orelojn. Tiam la kelnero diras...

- Kial vi metas la olivojn sur viajn orelojn.

- Ho! Ĉar ne estas kukumetoj.

Juan José Vázquez



POEZIO

Ci tiu poemo estas la unua premio de la II^a Literatura Konkurso de Madrida Esperanto-Liceo. Ni esperas ke ĝi plaĉos al vi.

doloro

Flugante al la kosmo al kosmos
ploras la mevoj loran las av
Larmoj odoras Unas lagrimas huelen
blankaj revoj unes blancas las
fajnaj kaj molaj agudoj y blandas
kvazaŭ orienta silko
vaporas. se evapora

Zora Heide

LA LEGENDO DE AITOR

Ĝi tiu rakonto klarigas, laŭ la plej malnova tradicio, la devenon de la Vaska Popolo. Kvankam iom fantazia, tamen ĝi eble enhavas kaŝitan mesaĝon, kiun ni ankoraŭ ne povis malkovri. Jen la legendo:

"La gepatroj de Aitor malsupreniris de la montoj Ararat, inter kiuj leviĝas la monto Borbeya, kie fondotuŝis la Arkeo post la Diluvo.

Sekreta inspiro impulsis ilin repopolumi la okcidenton, kaj ĉe la piedo de la Kaŭkaza Montaro ili starigis siajn tendojn. Tie ili restis dum longaj jaroj, ĝis kiam, ĝenitaj de la atakoj de la najbaraj keltoj, kiuj avidis iliajn bestarojn kaj malabundajn rikoltojn, diris Aitor al siaj filoj kaj tribaroj:—Ni serĉu pacon kaj foriru el la verdejoj. La homa paradizo ne estas sur la tero.

Ili malstarigis la tendojn, forlasis malĝoje siajn varmetajn riverojn, kaj, pilgrimante laŭlonge de la marbordo, alvenis kun siaj bestaroj en Akvitanon—kien iras, demandis la patriarko, tiuj kolomboj, kiuj komence de la vintro trairas tiujn ĉi ebenaĵojn?. Kolombo estas simbolo de la paco. Filoj kaj tribaroj miaj, ni rigardu, kie tiuj birdoj haltas; kie ili ripozos, ni ripozos; kie ili dormos, bonŝanco nestos".

. . .

"Kaj li daŭrigis la pilgrinadon kun siaj filoj kaj tribaranoj, tendoj kaj bestaroj; la birdoj, kiuj elmigris el la Norde, leŝtis iliaj gvidantoj.

Iun plenuman nokton li levigis siajn okulojn por kontempli la firmamenton, kaj miris la argentan supraĵon de la Pireneoj. - Aurrera, mutillak! (Antaŭen, knaboj!), ekkriis Aitor, ni fariĝu posedantoj de ĉi tiuj montoj, kaj neniam forlasu ĝiajn valojn. Homo devas loĝi apud sia tombejo, kaj la tombo de Aitor estas la Pireneoj. Kaj la sep filoj de la maljunulo dividis inter si la okcidentan montaron por loĝi ĉirkaŭ sia patro. En la montaj ŝirmejoj dormis la kolomboj.'

. . .

"Sed la tribaronoj de L' Patriarko, kiuj posedis la reston de la montaro, murmuris: - La kolomboj dormas en ĉi tiuj anguloj kaj poste foriras. Ni ripozis kaj nun sekvos ilin. Ni vidas grandajn ebenaĵojn sude, kiuj eble estas fruktodonaj riverbordoĵoj; ĝis ĉi tie venas bonodoro. Ni trinku kvon el tiuj riveroj; ni gustumu la fruktojn de tiuj riveroj; ni gustumu la fruktojn de tiuj bonodoraj arbaroj; ni disdonu inter ni la fruktodonan sudan kamparon. - Lasu ilin foriri, filoj miaj-diris Aitor, kaj ne murmuru pri mia elekto. Ĉu vi deziras esti riĉaj kaj samtempe sklavoj? Sekvu ilin, divestiĝu sur la ebenaĵoj. Ĉu vi preferas esti liberaj, kvankam forgesitaj kaj malriĉaj? Restu sur la montaro. Neniu el la filoj forlasis la patron, kiu danke aĝoris la plej altan Dion."

. . .

"Tie finiĝis la pilgrinado de Aitor; la kabanĉjo sekvis la tendojn, grenoj kaj fruktoj alternis, — bestaroj obliĝis. Kuŝis li fine preskaŭ senviva en sia paŝla lito, kaj ĉirkaŭ li staris liaj sep filoj kontemlante lin. La koloro de lia vizaĝo estis jam simila al tiu de la longa barbo, sed lia rigardo serena. Justulo ne timas morton. Filoj miaj — li ekkriis — akvo inundis teron, sed ĝiaj krimoj ne dromis; insuloj supakviĝis, sed eraroj surnaĝis. Rigardu ree la teron infektitan per idolismo. Kredu al Dio, kaj obeu viajn gnostojn. La riĉaĵoj, kiujn vi akortis kuri mi, restas enterigitaj ene de la tero. Mi lasas al vi malriĉecon kiel bonŝancon kaj rokojn por heredo. Ne konkeru teritoriojn kaj ne timu esti konkerataj."

. . .

"Diris Aitor, kisis siajn filojn kaj tuj mortis. Post la morto de la Patriarko, la sep filoj malsuave prenis en la ebenaĵojn kaj foris la sep vaskaĵn tribojn."

Ana M^a Ranero Antolín




ŜAKA KURIOZAĴO

ĈU ONI POVAS PRUVI, KE PER ŜAKTABULO $64 = 65$?

Cu vi estas certa, kara leganto, ke ŝaktabulo havas ĉiam 64 ĉelojn?

Nu, dividiĝis tabulo de amiko mia en kvar pecoj, kiel oni montras sekve (1), kaj li sendis ĝin al lignaĵisto, por ke ĉi tiu aranĝu ĝin .

Li, kiu sciis nenion pri la nobla ludo ribarite redonis ĝin, sed sube (2) oni novas vidi kiel la lignaĵisto unuigis la kvar pecojn. Imagu la surprizon de mia amiko, kiam li nombris la ĉelojn de la tabulo.



ESTRARO

PREZIDANTO

JORDI FERRE I MARTINEZ
Carreras Candi 25 B 1ª 4ª
Barcelona-28-

VICPREZIDANTO

ANA MA RANERO ANTOLIN
Duques de Najera, 20 8ª
Logroño.

SEKRETARIO

SALVADOR GUILLERMO I
VINETA
Escultor Canet 20 1ª 2ª
Barcelona-28-

VICSEKRETARIO

F. MIGUEL NUÑOZ GARRE
Carretera de Baniel, 47
Alquerías (Murcia)

ASISTO

CARLOS ARAGAY GIRONA
C/Bassegoda, 40 3ª 1ª
Barcelona-28-

HEJE reprezentanto en

TEJO

CARLOS N. MOYA SEGUI

H.E.J.S.- Delegitoj:

Elche:

Antonio Verdú Caselles
C/ José Bernard Amorós, 38
Elche. Alicante.

Logroño: A. Ma Ranero Antolin.

Madrid: M. A. Sancho.
C/ Marcelo Usara, 163
Madrid - 26.

Málaga: F. Albert Reyna.
3da. La Paz; Bloque 2
C/ Beethoven, 6 1ª F
Málaga, 4

Murcia: F. Miguel Nuñez Garre.

Valencia: Carlos N. Moya Seguí.
Avd/ del Cid, 106
Esc. 1, 7ª.
Valencia - 18

SIDEJO de Hispana Esperanta Junulara Sekcio (de H.E.F.): C/ Carreras Candi, 34 - 36. Barcelona, 28

Pariĝu membro de H.E.J.S!